

La laboro de la Internacia Civila Helpservo en Grekujo

Claude Gacond, 81-a radioprelego, 1964.06.17 & 20

Atentu esperantistoj! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la laboro de Internacia Civila Helpservo en Grekujo. Vi aŭdas Claude Gacond.

Tiun ĉi aŭtunon Internacia Civila Helpservo ĉesos sian laboron en vilaĝo de Grekujo. Estas interese ekzameni, kion tiu movado entreprenis dum la tri lastaj jaroj en tiu lando, por provi fari konkludojn koncerne al la helpo en subindustriaj landoj.

Ni diru kelkajn vortojn unue pri la historio de Grekujo, ĉar ĝi klarigas la nunan ekonomian situacion. De la 15-a jarcento turka regado malebligis la grekojn partopreni al la evoluo de sia kulturo. Por ili ne plu ekzistis lernejoj, eĉ dum iuj epokoj estis malpermesite instrui la grekan lingvon. Sole, kiam eblis, la lernejo asekuris iun rifuĝejon al la greka spirito. En ĉiu komunumo riĉa turko deĵoris kiel imoŝtrivekanto, li provis ricevi kiel eble plej multe da mono. Dum kvin jarcentoj ĉiuj streĉoj por pli intensigi la terkulturadon nur povis profiti al la okupanto, tio klarigas la nunan pasivecon de la greka kamparano. Oni ne plu rigardis al la estonto, oni nur vivis por la nuna tago.

En la norda parto de Grekujo la turka reĝimo nur finiĝis fine de 1912, post la unua balkana milito. De tiam oni estus povinta teorie progresi. Sed paco neniam sufiĉe longe regis por ebligi trankvilan disvolviĝon. La du balkanajn militojn sekvis la unua mondmilito kaj la greko-turka milito. Post tiu nova katastrofo unu miliono kvarcent mil grekoj devis forlasi Turkan Azion por rifuĝi en Grekujon sen povi savi siajn posedaĵojn, dum tricent okdek mil turkoj kaj kvindek mil bulgaroj devis elmigri. Tiuj rifuĝintoj reprezentis la kvaronon de la loĝantaro. La rezulto estas, ke dum la postaj jaroj pli ol cent kvindek mil personoj mortis pro malsato aŭ kontaĝaj malsanoj. Tiujn rifuĝintojn ankoraŭ ne asimilis la lando, ke tiam jam la dua mondmilito eksplodis kaj vidis la germanojn okupi la landon. Post tiu milito okazis civila milito inter la naciistoj kaj komunistoj, kiu finiĝis nur en 1949 kun la venko de la naciistoj. La landa disvolviĝo nur povis komenci en 1953 post la mona reformo.

La printempon 1960 germana movado nomata **Aktion Sühnezeichen** malfermis laborejon en Servia. Ĝi volis montri, per la laboro de volontularo en tiu urbo detruita de la germanoj dum la dua milito, ke la germana popolo ŝanĝiĝis. La volontuloj konstruis cisternon kaj komencis la konstruadon de publika banejo kaj de du domoj. La konstruejo daŭris unu jaron. Sed en marto 1961, kiam la volontularo foriris, la laboro ne estis finfarita. Tamen restis ankoraŭ mono disponebla. Tiam Internacia Civila Helpservo decidis daŭrigi la laboron en Servia kun la restanta mono.

Unue estis necese fini la komencitan laboron. La civila servo dungis grekajn laboristojn, kiuj kutime senlaboras, por tiu laboro. La civila servo enkadrigas per siaj volontuloj la enlandan laboristaron. Estas stulte konkurenci per volontuloj senlaborulojn, kiuj nur havas unu deziron, trovi laboron. En la subindustriigitaj landoj, kio plej mankas, tio estas la laboristaj fakuloj. Tion la civila servo alportis surloke.

Dum tiu tempo laborplanoj estis deciditaj. Por kontraŭbatali la virinan senlaborecon la civila servo decidis munti teksejon duobligitan de ĉedomo manlaboro, ĝi decidis organizi sanitaran servon kaj malfermi socian helpon.

Por tiuj celoj la volontularo de la civila servo estis formita unue de kuracistino, flegistino, teksinĝeniero, teksmonitorino kaj tri metiistoj. Aliaj volontuloj ne estis necesaj, ekzistis sufiĉe da grekoj, kiuj serĉas laboron. Laŭ la statistikoj nur 60 procentoj de la grekoj en Makedonio havas laboron. La salajroj pro tio estas tre malaltaj. Kvankam la leĝo garantias minimuman salajron de po 40 drakmoj tage por la virinoj, la faktaj salajroj kutime nur atingas la duonon : 20 drakmojn. Unu litro da lakto kostas 6 drakmojn, 1 kilogramo da pano 3 aŭ 4 drakmojn.

La laboro de la Internacia Civila Helpservo en Grekujo

Claude Gacond, 81-a radioprelego, 1964.06.17 & 20

En multaj domoj ekzistas teksiloj. Plejmulto el la virinoj kapablas teksi, sed ili tion faras nur por siaj hejmaj bezonoj. La civila servo decidis plibonigi la kolorojn kaj la motivojn por provi poste vendi tiujn teksaĵojn en Svislando kaj en tuta Eŭropo. Kolekto de specimenoj interesis diversajn firmaojn. La teksilo de la civila servo estis uzataj por teksi modelojn, kiuj poste estis disdonitaj al la virinoj kun lano. Ĉiu hejmfarita teksaĵo estis tuj pagita. Tuj 25 virinoj povis tiel ricevi laboron, tio signifis entute po 200 plenajn labortagojn monate. Post la foriro de la civila servo tiu laboro daŭros, ĝi eĉ verŝajne kreskos, ĉar ekde la printempo 1962 ĝi ne plu bezonis financon helpon. En 1963 ĝi eĉ alportis rimarkindan profiton, kiu permesos fondi tekskooperativon. Kiel vi konstatas, ekzistas granda diferenco inter la helpo de tiu filantropa movado, kiu sendis dum unu jaro volontularon por konstrui aferojn eble eĉ ne deziritajn de la loĝantaro, aferojn, kiujn ili ne kapablis finkonstrui, kaj la labormetodo de la civila servo, kiu, post atenta studo de la regiona situacio, trovis la plej taŭgan metodon por alporti plej rapide laboron al plej multe da personoj. Tio ne estas nura donaco, ĉar tio devigas la loĝantaron kunlabori. Tio estas nura plej bona uzo de helpemo kaj kuraĝigo.

Dum nia venonta elsendo mi daŭrigos mian priskribon de la laboro de la civila servo en Grekujo. Kiel vi konstatos, ĝi pravas grandan spiritan maturecon.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la laboro de Internacia Civila Helpservo en Grekujo.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-